

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelijks
Zeventiende jaargang
Nummer 1 (187)
JANUARI 1950

Vertegenwoordiger in Nederland :
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :
* Leden : 75 fr.
* Steunleden : min. 150 fr.
Inwonende leden : 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :
België : 60 fr.
Ceteraj landoj : 75 bfr.
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

DOKUMENTA SERVO

Okaze de vizito al aŭtoritatoj, propagando en sciencaj kaj aliaj rondoj kaj ĉe kompilado de aktualaj propagandaparoladoj, verŝajne multaj esperantistoj same kiel mi sentis la mankon de dokumenta servo, kiu povas havigi ĝisdatajn informojn, faktojn kaj statistikojn, kiujn oni tiucele bezonas. Pro tio mi tre ĝojas pri la aktiveco de s-ro G. P. de Bruin, gvidanto de la dokumenta servo de N.C.K.E., kiu intencas verki artikolojn pri freŝdataj okazoj, akiritaj sukcesoj, k.t.p. Ĉi sube sekvas enkonduka artikolo lia. Mr A. J. Kalma

Esperanto, kiu volas sukcese varbi por nia afero, devas disponi ne nur pri taŭgaj kaj konvinkaj argumentoj koncerne la neceson kaj utilon de mondlingvo, sed li bezonas

Stojan, tre valora verko, sed ne plu ĝisdata. Ĝi aperis en 1929 kaj do malfruas 20 jarojn.

Tre gravan kaj multan materialon oni trovas en la *Enciklopedio de Esperanto*, sed ĝi aperis en 1933-1934 kaj jam estas ne plu aktuala. Do, se oni bezonas informojn el la lastaj 20 jaroj, oni devas serĉi ilin en diversaj disaj revuoj kaj gazetoj, kio postulas multan penon kaj kaŭzas grandan tempoperdon.

Ĉi supraj konstatoj kondukas al la konkludo, ke io mankas al ni, ke la fako « dokumentado » ne estas bone prizorgata. Ĉi tiu situacio estas nepre ŝanĝenda. Sed kiel ?

En la nuna tempo estas tre malfacile eldoni suplementon al la Enciklopedio. Krome tia eldonaĵo ne



Zaandam (Ned.), 15-9-49 — Mej. Trientje KUIT en de Deen H. H. CHRISTENSEN staaŭn voor de Heer C. WALS, ambtenaar van de Burgerlijke Stand en zelf Esperantist, die het huwelĝk voltrekt. ...in Esperanto!

nas ankaŭ materialon kaj faktojn, kiuj atestas pri la jamaj disvastiĝo kaj multflanka uzado de Esperanto.

Ĉe la propagando utilos al li : ciferoj pri la nombro da esperantistoj en diversaj landoj kaj en la tuta mondo, titoloj de gravaj verkoj originalaj kaj tradukitaj, informoj pri la amplekso de la esperanto-literaturo, dokumentoj pri la uzado de Esperanto fare de gravaj institucioj neesperantistaj, pri la instruo de nia lingvo en lernejoj kaj universitatoj, pri la subteno al nia afero per subvencioj de urbestro kaj parlamentoj, ktp., ktp. Estas necese, ke ĉi tiu materialo, laŭeble aktuala ĝis la plej lasta tempo, en konciza formo, estu facile trovebla kaj konsultebla. Sed bedaŭrinde ni ne havas tiurilatajn ciferojn kaj dokumentojn en tia formo je nia dispono.

Pri la nombro da esperantistoj ekzistas nur tre malnoviĝinta kaj do ne plu ĝusta statistiko de s-ro J. Dieterle el la jaro 1926. Verko pri nia literaturo estas la *Bibliografio de Internacia Lingvo*, de P.

estas aĉetebla de ĉiu esperantisto. Kaj plue estiĝas ĉiujare nova materialo, kies kolektado kaj registrado estas dezirindaj.

Se ni disponus pri Internacia Komitato, en kiu la ĉefaj tutmondaj organizoj estus reprezentitaj, ĝi facile povus starigi dokumentan fakon, kiu kolektus raportojn, eldonaĵojn, ktp. Tiu fako kunmetu ĉiujare kronikon kaj publikigu ĝin en la *Jarlibroj*. Se tia kroniko aperus en ili ĉiujare, ĉi tiuj eldonaĵoj fariĝus per tio pli valoraj kaj pli utilaj. Ili ne plu perdus sian valoron post forpaso de la jaro, kaj fariĝus havindaj ankaŭ por tiuj, kiuj eble ne uzas la adresaran parton.

La materialo utilus ankaŭ por la kompilado de eventualaj suplementoj al la Enciklopedio. La ciferaĵoj informoj ebligus esplori, ĉu la movado kreskas aŭ ne, kaj kiel kaj kiom.

Alia avantaĝo estu, ke tiuj, kiuj ne povos aĉeti la Enciklopedion, tamen ekhavas en konciza formo la ĉefan historian kaj dokumentan materialojn pri la kurantaj jaroj.

Atendante la efektivigon de ĉi supre esprimita ideo, ni esperas servi al la movado per publikigo de tiuspeca kroniko en niaj gazetoj.

G. P. de Bruin
Gvidanto de la Dokumenta Servo de N.C.K.E.

Ni deziras

al L.E.E.N., resp. al la Flandra Ligo Esperantista :
estu bona la Novjaro
plimultiĝu la membraro,
al la anoj
havu sanon, forton, monon,
mondkongreson, lingvokonon,
al la Esperantistaro, tie ĉi kaj
trans la maro
estu tre feliĉaj en la Nova Jaro !
La Abonantaro.
(laŭ Julio Baghy en :
« La vagabondo kantas ... »)

IMITINDAJ EKZEMPLOJ

Al nia sugesto, ke la anoj, kiuj povas malhavi iom pli, libervole pagu pli altan kotizon por la L.E.E.N.-kaso, sekcio Groningen respondis, ke ĝi aprobas tiun sugeston kaj instigos siajn anojn agi laŭ ĝi. Sekcio Groningen aldonis, ke ĉiu sekcio varbu kiom eble plej multajn donacantojn kaj krome sugestis, ke la sekcio aranĝu tombolon aŭ ion tian profite al la L.E.E.N.-kaso okaze de specialaj vesperoj. Sed Groningen ne nur sugestis sed jam agis laŭ tiu sugesto aranĝante tombolon okaze de Sankta Nikolao kaj surprizis nian kasiston per mondonaco de g. 16.30, la rezultato de tiu tombolo. Ni kore dankas al niaj groningenaj amikoj pro tiu imitinda ekzemplo.

Nia eta sed nemortipova sekcio en Boskoop respondis al nia sugesto jene : « Por ebligi la eldonon de nia organo en la nova jaro, nia klubeto estas preta pagi en 1950 libervole la sumon de dek guldenoj. » Nur sesope kaj neriĉaj estas, niaj karaj Boskoopanoj, sed ili donis bonegan ekzemplon al la pli grandaj sekcioj !

ĈEĤOSLOVAKA RADIO, E-FAKO
(Praha XII, Stalinova 12, ĈSR)

deziras al ĉiuj S-anoj ĉion bonan por
Kristnasko kaj Novjaro. Ĝi rememorigas
ke ĝi elsensas jene :

ĉiutage 15.45-16.00 h. 31,41 kaj 1935 m.
22.00-22.15 h. 49.92 m.

ĉiulunde) mez-onde 22.45-23.00
merkrede)

VERDA STACIO elsendas sian artprogramon la unuan merkredon de ĉiu monato 23.00 h. — 270 m. kaj 335 m.

Konfirmu ke vi aŭskultas nin kaj
eventuale ke plaĉas al vi niaj programoj!
VIA LETERO SIGNIFAS NIAN
PLUAN E-ELSENDON.

LA PARIZA KONGRESO

Kongresejo. — La kongreso definitive okazos en « Sorbonne », sidejo de la Pariza Universitato. La malferma kaj ferma kunsidoj okazos en la granda amfiteatro, kiu povas enteni 2700 personojn. En « Sorbonne » ankaŭ okazos la interkonatiga vespero.

Balo. — La tradicia balo kun naciaj kostumoj estos aranĝata en la admirindaj salonoj de Hôtel Continental, la plej luksaj en Parizo, kiuj povas enteni 3000 dancantojn.

Poŝtoŝejo. — La Ministro de la francaj poŝtoj konsentis pri la instalo en Sorbonne, dum la daŭro de la kongreso, de poŝtoŝejo, en kiu la korespondadoj estos stampataj per speciala marko. La Ministro konsideros la eldonon de poŝtmarko kun esperanta teksto. La realigo de tiu grava projekto dependos de decido de la Ministra Konsilantaro.

Transportoj. — La administracio de la francaj fervojoj konsentis doni al la kongresanoj jenajn avantaĝojn :

rabato de 20 % por tiuj kiuj vojaĝos individue ;
rabato de 30 % por tiuj kiuj vojaĝos kolektive.

Tiuj rabatoj validos nur ekde la franca landlimo.

Loĝado. — La kongresanoj, kiuj tion deziras, estos loĝigataj en la liceoj de Parizo. La dormejoj estos aŭ ne, laŭ la liceoj, apartigitaj en ĉambroj per kurtenoj aŭ lignaj vandoj.

Por la kongresanoj, kiuj deziras loĝi en tendo, la kongreskomitato disponos pri la bela dekhektara parko de la liceo Michelet, je sep minutoj piede de la Metrostacio « Porte de Versailles » kaj je dudek minutoj de « Sorbonne ».

Pri la hoteloj, kiuj estos superŝutataj de la turistoj, nia agentejo Cook garantios ĉambron al niaj samideanoj laŭ la ĝusta prezo aprobita de la Pariza Prefektejo. Se, en iu kazo, ne restus ĉambro je la prezo petita de la kongresano, la agentejo devus oferi ĉambron de kategorio analoga, nur iom supera.

Internacia Somera Universitato. — Serio da ok prelegoj estos farata en « Sorbonne » de kelkaj famaj profesoroj, kiuj praktikas Esperanton. Al tiuj prelegoj estos invitataj ne esperantistaj kleruloj, por ke ili povu persone konstati la tujan komprenon de nia lingvo ĉe diversnacia publiko.

Ekskursoj. — Multaj ekskursoj estos organizataj, kiuj permesos al niaj samideanoj vidi la ĉefajn monumentojn de la urbo kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

Postkongresaj ekskursoj. — Aliaj ekskursoj kondukos, laŭ niaj nunaj projektoj, niajn samideanojn al la plej belaj regionoj de Francujo : al « Mont St-Michel » kaj Deauville ; al Strasbourg kaj la Vogezoj ; al Marseille kaj la Mediteranea Maro (kun promenado sur la maro), al Nice, Annecy kaj Chamonix.

LITERATURA MONDO

pro financaj malhelpoj ne plu aperos!
En la pasinta jaro aperis kvar n-roj anstataŭ la ses anoncituĝ. Kvankam L.M. enspezis eĉ ne la preskostojn, ĝiaj reprezentantaj repagos la trionon de la abonsumo, kion faris F.E.I. havigante al ĉiu paginto librokuponon de Fr. 50.—

Jus aperis :

JAMES D. SAYERS

INVITO AL ĈIELO

Originala Romano

Siegfried Ziegler Eldonejo en München, kiu antaŭ nelonge surprizis la Esperantomondon per la aperigo de rimarkinda kaj teknike perfekta eldono de la « Faŭsto » de Goethe, ĵus eldonis novan originalan romanon de la profundsenta, emociiga James D. Sayers.

La ducentpaĝa libro estas duontole bindita kaj sub ilustrita ŝirmkovrilo aspektas nerezisteble alloga. Prezo : 75 bfr.

Mendu vian ekzempleron ĉe Flandra Esperanto-Instituto. P. van Humbeekstr. 3, Brussel-West.

Al ĉiuj siaj membroj
al ĉiuj siaj legantoj
deziras Novjaron
feliĉan, prosperan
L.E.E.N. — F.L.E.E.



OBSERVOJ

LA STUDANTO

Bibliografio

NI ESTU GENTILAJ!

Bonedukiteco implicas certagradan gentilecon kaj delikatecon en konduto, parolo kaj skribo.

Estas evidente, ke en Esperantujo ĉiu rajtas propagandi sian preferatan organizaĵon. Eĉ emfazi ke ĝi, nur ĝi meritas nian membrecon, ne estas peko kontraŭ la reguloj de la takto. Sed estas krude kaj malinde, pretendi ke aliĝo al alia organizaĵo estas ago perfida.

Tial « Sennaciulo » kondutis kiel « sentaktulo », aperigante frontpaĝe jenan averton: « Ĉiu ero da energio, ĉiu monero elspezata por la neŭtrala esperanta movado signifas samproporcion perfidon al la SAT-movado ».

Ni estu gentilaj, eĉ inter esperantistoj! PIK.

ESPERANTO GEEN OPLOSSING?

« De Standaard » (Brussel) van 25-11 publiceert een even uitvoerig als belangrijk hoofdartikel: Een andere taalkwestie.

Na gewezen te hebben op de steeds talrijker wordende centra van internationaal contact, samenwerking en overleg, wordt de overgevoeligheid van het nationale prestige der grote mogendheden belicht, alsmede de stille maar hardnekkige taalstrijd die daaruit voortspuit. Na nauwgezet de balans te hebben opgemaakt van de voornaamste talen excuseert zich de schrijver alles tot een bespottelijk rekensommetje te willen herleiden, en schrijft: Het zal wel nooit mogelijk zijn een definitieve regeling vast te stellen in zake internationaal taalgebruik. De taal is daartoe een veel te krachtig levend organisme en dus nauw verbonden met al het andere leven: machtsontplooiing, economische groei, ontwikkeling van sociale krachten, enz. Daarom ook biedt een « kunsttaal » als Volapuk en Esperanto geen oplossing, al kan ze onder bepaalde omstandigheden misschien wel als een hulpmiddel aanvaard worden.

JIUST DAAROM: ESPERANTO!

Het in één adem noemen van Volapuk en Esperanto toont aan dat de schrijver van vernoemd artikel onvoegd is om inzake kunsttalen een oordeel te vellen.

En juist omdat de taal een zo krachtig levend organisme is, zien wij, esperantisten, geen oplossing buiten het neutrale Esperanto, de tweede taal voor ieder, de taal voorbehouden voor het internationaal gebruik. Want buiten deze oplossing ligt slechts de mogelijkheid van een wisselvallige, nooit beslechte en eeuwigdurende taalstrijd!

COLIN EN STANLEY SMITH

Vrijwel iedereen kent nu deze twee esperantisten die in 43 dagen in hun zeilbootje de Atlantische Oceaan overstaken. Met deze vermetele daad hebben de gebroeders Smith de aandacht der wereld op Esperanto gevestigd. Van 19 September tot 15 October j.l. hebben zij hun bootje tentoongesteld in « Olympia », een groot amusementsgebouw te Blackpool. Ruim 35.000 bezoekers hebben daar het bootje met de Esperantoname « Nova Espero » en de Esperantovlag in top gezien. De Engelse esperantisten hebben deze gelegenheid te baat genomen om propaganda te maken. Behalve het bootje kregen de bezoekers van de tentoonstelling Esperantoliteratuur te zien, waardoor zij een indruk kregen van de groeiende betekenis onzer beweging. Bovendien werden er strooibiljetten uitgegeven en Esperanto-leerboekjes verkocht. Kortom: een prachtige propaganda!

DE NIEUWE ESPERANTOMARS.

In elke Nederlandse muziekhandel is thans de gramfoonplaat met de Esperantomars (componist: Jac. Feitsma), gespeeld door de Amsterdamsche Politiëkapel, te koop. Vraagt naar Decca-plaat M 32637.

Uitzending van de Esperantomars door de radio vormt een prachtige propaganda. Verzoekt dit dan ook aan de omroepverenigingen!

DE ENGELSE TAAL VERDRONGEN.

Dat het Engels gestadig veld verliest blijkt nu weer uit de beslissing op 14 September ll. door de wetgevende vergadering van India getroffen, waarbij het Hindi als officiële taal van de Indische Unie wordt aangenomen. Van het Engels zal evenwel nog gedurende een overgangstijdperk van 15 jaar gebruik gemaakt mogen worden. De rol van het Engels als de administratieve taal van honderden miljoenen mensen loopt ten einde.

La gvidanto de « La Studanto » deziras prosperan jaron al ĉiuj gestudentoj kaj denove petas ilin konigi al li event. dezirojn rilate la enhavon de ĉi tiu rubriko.

Uitwerking van de eerste opgave in het vorige nummer:

1. Frederiko la Dua vivis en la deka jarcento.
2. Ekzistas pri li multaj rakontoj, kiujn la plimulto da homoj volonte legas kaj trovas tre belaj.
3. Ĉi tiuj rakontoj tamen ne ĉiam estas veraj.
4. Iun vesperon Frederiko estis invitinta nombron da amikoj.
5. Kiam la reĝo mem estis enirinta la manĝosalonon, ĉiuj eksidis.
6. Unu el la gastoj estis kuracisto, kies nomo estis Leiner.
7. La kuracisto sidis ĝuste kontraŭ la reĝo kaj ĉi tiu alparolis de tempo al tempo ankaŭ lin.
8. Li demandis al li ion pri kelkaj malzanoj.
9. Al unu el tiuj demandoj la kuracisto ne povis respondi, kio mirigis la reĝon.
10. Frederiko prenis pecon da (de) papero kaj kraĵonon.
11. Per ĝi li skribis ion sur la papero(n) kaj poste donis ĝin al la kuracisto.
12. La enhavo estis: « Leiner estas azeno » kaj sub tio staris la nomo de la reĝo.
13. La reĝo petis Leiner, ke li laŭtleĝu la tekston sur la papero.
14. Ĉi tiu surmetis siajn okulvitrojn (meervoud!) kaj atente rigardis ĝin.
15. Komence (beter dan « unue », dat « ten eerste » betekent) li ne scilis kion fari, sed subite li ridetis.
16. Li diris: « Via reĝa moŝto sendube eraris, ĉi tio ja ne povas esti vera ».
17. Severe Frederiko respondis, ke li faru kion lia (niet « sia »!) reĝo ordonis al li.
18. Tiam la kuracisto laŭtvoĉe legis « Leiner estas (unu) azeno, Frederiko la Dua ».

Uitwerking van de tweede opgave:

1. Mi ne kredas, ke li diris la veron.
2. Pro sia malsaneco li ne povis ĉeesti la kunvenon.
3. En la malproksimo mi vidis dometon.
4. La verda standardo signas la bonon kaj belon.
5. La malvarmece de la aero, tremigis lin.
6. Lia boneco ne havis limojn.
7. Mi dubas pri la vereco de lia rakonto.
8. Li estis en la proksimo.
9. Sano estas enviinda posedaĵo.
10. Lia malsaneco subite pliĝavigis.
11. Tiu kondiĉo certe donos utilon al vi.
12. Mi ĝojis pro la proksimeco de la celo.
13. Mi faris tion, celante vian bonon.
14. La utileco de Esperanto estas nefaksebla.
15. La pureco de la ĉambro atestis pri ŝia diligentece.
16. La kompatindulo estis preskaŭ tute kaptita de malvarmo.

Uitwerking van de laatste opgave:

Vi scias, ke mi ĉiam plene aprobis la ideon pri la Delegacio kaj elkore mi deziras al ĝi kompletan sukceson. Kun bedaŭro mi tamen devas teni min flanko de ĝi ĉar allokaze oni dirus, ke mi laŭdas la Delegacion nur, ĉar mi esperas, ke per ĝi Esperanto venkos! Mi ne rajtas publike paroli pri tio sed persone mi ĉiam kaj al ĉiu rekomendas laŭpove la Delegacion. En la unua teksto de mia Deklaracio de Bulonjo estas dirite, ke la esperantistoj nur provizore fervoras por Esperanto ĝis la tempo, kiam iu aŭtoritata internacia kongreso faros la definitivan elekton de internacia lingvo kaj tiam la esperantistoj promesas senproteste kolektiĝi ĉirkaŭ tiu lingvo, kiun la nomita kongreso elektos. Sed ve, la esperantistoj devigis min, forstrekli ĉi tiun punkton el mia Deklaracio.

TEMPO ESTAS MONO

Komeracisto havis ... intenco fari longa vojaĝo. Li diris adiaŭ... liaj amikoj kaj diris: « Mia tempo estas grandvalora. Pro tiu nur skribu, kiam absolute estos necesa. Mi tute ne ŝatas, ke mi ricevas leteroj. Kutime ili servas...nenio ».

Unu monaton pasis — du, tri monatojn. La komercisto ne revenis kaj ankaŭ ne skribis. Liaj amikoj iĝis maltrankvilaj sed ne havis ...kuraĝo por skribi. Subite unu de ili havis bona ideon. Sur papera folio li skribis kun kraĵono granda signo de demando. Tiu signifis: « Ĉu io nova? » Post kelkaj tagoj venis... respondo. Oni malfermis...leteron kaj trovis — nur blanka paperfolio. Oni komprenis, ke tio signifis: « Nenio ».

Niajn komencantojn ni petas anstataŭigi la punktojn per la ĝusta vorto (artikolo aŭ prepozicio). Krome ili bonvolu korekti eventualajn erarojn kaj anstataŭigi la kursivajn esprimojn per mallongaj elegantaj formoj.

SENPERA VERBIGO

En Esperanto oni povas fabriki novajn vortojn per kunmeto de simplaj vortoj.

Ĉar laŭ la 11-a regulo de la Fundamenta Gramatiko la gramatikaj finaĵoj o, a kaj i estas rigardataj kiel memstaraj vortoj, oni do el substantivaj kaj adjektivaj radikoj povas fari verbojn, anstataŭigante la finaĵojn o kaj a per i. Se substantiva radiko signifas ilon aŭ korpoparton, la analizo estas *agi, funkcii per*, ekz. martelli, tamburi, brosi, genui; se ĝi signifas alian objekton la analizo povas esti *provizi per*, ekz. gudri, stani, sali, kupri (antaŭe oni ofte uzis la sufikson -um aŭ la neoficialan sufikson -iz, ekz. orumi, kuprizi) aŭ *agi, karakterizate de*, ekz. sangi, flori, nesti, kongresi, flami, kaj se ĝi indikas personon, la analizo estas *agi kiel*, ekz. gastii, estri, mastri. La praktika bezono pri tiaj verboj kreas ilin kaj samtempe donas al ili difinitan signifon. Ĉe verboj, derivitaj el adjektivaj radikoj, la analizo estas *esti -a*, ekz. preti, utili.

Tiu procedo, tre bonvena al poetoj, kiuj ofte bezonas mallongajn vortojn, ebligas fabrikadon de multaj verboj, ofte ne per unu vorto tradukeblaj en la nederlandan lingvon. Zamenhof mem jam uzis ekz. *ŝip(ad)i kaj voĉi*, Grabowski en « Sinjoro Tadeo » ekz. *skandalii* (indignigi per skandalo), *patri* al iu (esti kiel patro), jam *tempas, prudenti kaj modesti*. En « Cezaro » oni trovas multajn tiajn verbojn, el kiuj pluraj estas kompreneblaj nur el la kunteksto, ekz. *distanci* (vervinderd zijn), *ekzempli* (voordoen, een voorbeeld geven), *disbraki* (de armen uitstrekken), la ĉambro *pardas* en la ĝardenon (komt met een deur uit op), *aloreli* (in de oren klinken). Lastatempe la « senpera verbigo » fariĝis ŝajne infekta moda fenomeno; ĉe modernaj verkistoj la greno ne plu estas flava, sed *flavas*; la lernantoj de moderna kursgvidanto ne plu havas ferion, sed *ferias* kaj en tiu tempo la gvidanto do ne bezonas *kursi*. Kelkfoje oni tiamaniere povas krei trafajn vortojn, ekz. *cigaredu(m)i*. En la « frazo kelkaj knaboj sekrete *cigaredu(m)is* », la signifo de la verbo klare montriĝas el la kunteksto. Foje iu el miaj kolegoj diris ŝerce: « se la tramo estas for, ni devos *kruri* ». Ĉiu ridis sed neniu miskomprenis la signifon de « *kruvi* », sed ĉu la nederlanda frazo « hij beende stevig door » lasas ian dubon pri la signifo de la novbakita verbo? Troigante la senperan verbigon oni facile povas krei neklarajn vortojn aŭ idiotismojn, kaj ofte naskiĝas en internaciaj kongresoj, same kiel estiĝis ekz. *ŝtrumpinoj* (ŝtrumpoj por sinjorinoj), *gedormi* kaj novaj « mal » vortoj, ekz. *maltrinki* kaj *malmanĝi*, jam sufiĉe ofte uzataj anstataŭ malpli decaj esprimoj, troveblaj en iu « fekvortaro ». Oni do ne arbitre apliku la senperan verbigon, sed antaŭe konvinku, ĉu la nova verbo estas klara kaj pravebla. Cetere derivante verbojn el adjektivaj radikoj oni atentu, ke ekz. la esprimoj « *kuraĝi* » kaj « *esti kuraĝo* » ne estas identaj kaj ke se oni ekz. diras « la greno *flavas* », ne temas pri simpla konstato, sed pri la fakto, ke la greno impresas flave.

Ter vertaling:

Een rijke koopman uit Babel was weggereden naar Indië en stierf daar. Hij had beslist dat zijn twee zoons gelijkelijk zijn bezittingen zouden erven. Bovendien liet hij een geschenk van 30.000 goudstukken na, voor diegene van hen beiden, die hem het meest liefhad.

De oudste bouwde voor hem een grafmonument en de tweede zoon gaf een deel van zijn erfenis als huwelijkschat aan zijn zuster.

Alle mensen prezen de oudste broer, en zeiden, dat hij degene was, die zijn vader het meest liefhad, want de jongste hield meer van zijn zuster dan van zijn vader; dus de 30.000 goudstukken moest de oudste ontvangen.

De zaak werd voor een eindbeslissing voorgelegd aan de rechter. Deze liet hen één voor één bij zich komen en de oudste zoon sprak hij: « Uw vader is niet gestorven; hij is hersteld en zal naar Babel terugkeren ».

« God lof », zei de jonge man, « maar wat moet ik met het grafmonument doen, waarvoor ik zoveel geld uitgegeven heb? »

Daarna zei de rechter tegen de jongste zoon hetzelfde. Ook deze antwoordde: « God zij geprezen! » En hij voegde erbij: « Ik zal mijn vader alles teruggeven wat ik geërfd heb. Maar ik wil hem vragen, dat hij mijn zuster laat houden, wat ik haar heb geschonken ».

De wijze rechter antwoordde: « U hoeft niets terug te geven, maar U krijgt bovendien nog 30.000 goudstukken, want U bent degene, die het meest van zijn vader houdt ».

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten vóór 25 Januari aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; voor Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionka-de 6, Amsterdam-Z.

FAUSTO I de GOETHE, trad. N. BARTELMES. Eld. Siegfried Ziegler Verlag, München-Pasing. Germanujo. -190 p. - Luksa eldono. - 100 bfr., ĉe F.E.I.

Ke la Goethe-jaron ankaŭ en Esperantujo rememorigas tiel luksa eldono de *Faust I* (komparu nur kun la modesta libro el 1923) estas, krom la neceso de dua eldono, malgraŭ ĉio esperiga por la « verda » kulturo. La tolbindita, tipografie ege prizorgita libro estas okulgaa kaj la nova eldonoje gratulinda. Ĉar la kritiko estas pli facila (kvankam same necesa) ol la arto, ni volonte tuj igas la tradukinton partopreni en ĉi tiun laŭdon. Lia tasko estis certe peza kaj li plenumis ĝin tre kontentige, ofte eĉ brile.

Evidente ni ne postulas, ke li banale senualgigu la profundajn versojn de la genia aŭtoro al la novaj (kaj malnovaj) Esperantistoj, inter kiuj (tio ja okazas!) iuj nur ekkontaktos kun la mondfama verko pere de la internacia lingvo. Sed de revizio ni estus tamen atendinta ankaŭ la kvazaŭ kompletan ekstermon de ĝenaj inversioj, kiuj komplikas jam komplikan originalon. Ni komprenas, ke laŭ formo kaj enhavo la tradukinto celis kiel eble plej fidelan transigon, sed... Ofte etaj ŝanĝoj, helpe de inteligenta interpunkcio kaj iuj « licencoj » rezultigus plene ĝueblan tradukon. Ekz. - Se via ĝim palat' sopiras»; Agrable *kial* min penetras helo?»; Pro vi ne *kiu* amebrius?»; Sed vian *tagon* laŭdaklamis *Dolĉiran* viaj. Di', sendatoj; « En daŭra *vidus* vespera brilo/Je piedoj mondon *mi* silentan? » (*Mi suben vidus, en daŭra brilo/Vespera, mondon nur silentan*) k.t.p.

Ni estas konvinkitaj, ke la felicita sorto de nia poezio (traduka) nur rezultos, sendepende de la senapostrofiga bruado, per la envicigo de la vortoj en disciplinitan tutaron, kiu abomenas la teorie ĝustan uzon de la lingvo, permesanta — ektoleru emfazon — la dizerton de frazeroj je distanco, kie ordinara homspirito bezonas specialan carbo-loron por ilin percepti! Intertempe ni atente aŭskultu versojn kiajn jenajn:

Spirit' majesta, al mi ĉion donis
Vi elpetitan. Vi ne vane turnis
Vizaĝon vian en la fajr'al mi.
Reglondon al mi donis brilan la naturo.
La forton, senti ĝin kaj ĝui. Ne nur
Viziton malvarm-miran vi permesas,
Min lasas en profundan mian bruston
Rigardi kiel en amikan koron.

TYN.

KOMENTARIO AL FAUSTO I. de Max BUTIN. Eld. Siegfried Ziegler Verlag- 18 p. Prezo: 15,— bfr. ĉe F.E.I.

Tiu ĉi konciza komentario donas valoran helpon al la legonto de *Faust I* por ĝuste kompreni la esencon de la drama verko kaj la intencojn de Goethe, kiun oni ne senpreparu vizitu...

La nomo de *Max Butin* garantias ne nur bonan sed ankaŭ belan lingvon.

TYN.

LERNEJA REFORMO EN ĈEHO-SLOVAKIO. Tradukis J. Marik. Eldonis Instituto de Esperanto-servo en Praha. 60 p. 14,5 x 10,5.

La broŝuro enhavas la tekston de la nova « Lerneja Leĝo » de 1948; la klarigan paroladon de ĝia aŭtoro prof. D-ro Z. Nejedlý, ministro de Instruado, Sciencoj kaj Artoj, okaze de ĝia prezentado al la ĉeĥoslovaka Parlamento; komentario de J. Paur.

Ni montru kelkajn gvidajn ideojn, kiaj ili elpaŝas el la broŝuro: La leĝo realigas la principon de lernejo ekskluzive ŝtata;

Ĉar « la civitanoj estas egalaj ne nur antaŭ la leĝo sed ankaŭ en la klerigo, » ĉi-lasto estas deviga, unueca kaj senpaga en la unua- kaj duagrada lernejoj (9-jara);

La patrino lernejo (3 ĝis 6 j.) provizore ankoraŭ ne estas deviga;

Ekzameno « pri naturaj kapabloj » post la duagrada direktos unujn al la selektaj lernejoj (supera faklernejo, aŭ gimnazio prepara al universitato). La aliaj frekventos la bazan faklernejon, unu tagon en semajno;

Socialismo estas la celo de la edukado;

La rusa estas la dua lingvo en la instruoprogramo;

Pli aĝaj lernantoj fizike laboros 4 semajnojn en ĉiu lerneja jaro por forigi la antaŭjuĝon pri diferenco inter mensa kaj fizika laboro;

La instruistoj de ĉiugradaj lernejoj formigos en universitato.

Jen la ĝeneralaj direktivoj, la teoria bazo. « Detalojn kaj esceptojn normos la Registaro per dekreto. »

Rekomendata por matura pripensado speciale al la instruistaro kaj al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Orienta Eŭropo.

Fr. C.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst :
Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160.
Penningm. : P. M. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563.
Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermeuwstr. 29, Badhoevedorp
Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA CEFESTRARO

KARAVANO AL PARIZO

L.E.E.N. aranĝos karavanon al la Universala Kongreso de Esperanto sub gvidado de s-ro H. Bakker, kiu ankaŭ gvidis la pasintjara karavanon al Bournemouth. La partoprenantoj ĝuos rabaton de 30 % je la veturprezo de la francaj fervojoj kaj event. aliajn rabatojn. La kongreskotizon L.E.E.N.-anoj povos pagi ĝire al s-ro P. Moen, ĉefdelegito de U.E.A., Schaarsbergenstraat 104, Hago, poŝtkonto 79167. Ĉirkulero, jam dissendita al la sekcioj, donas detalajn informojn pri la kongreskotizoj, k.t.p. La adreso de la karavangvidanto, kiu poste detale informos la aliĝintojn pere de ĉirkuleroj pri la kongresaranĝoj estas: van Tuyl van Serooskerkenplein 33, I, Amsterdam-Z.

SOMERAJ KURSOJ

La granda sukceso de la pasintjaraj someraj kursoj en Kerk-Avezaath decidigis la ĉefestraron ankaŭ ĉi-jare klopodi pri aranĝo de someraj kursoj, ĉu en Kerk-Avezaath, ĉu aliloke. Kiel eble plej baldaŭ ni publikigos pliajn informojn.

N.C.K.E.

Kiel reprezentantojn por L.E.E.N. en N.C.K.E. la ĉefestraro de L.E.E.N. en sia kunveno, okazinta 17-18 XII '49 en A'dam, elektis por 1950 s-rojn A. J. Kalma kaj F. Weeke.

PREZIDANTA PROBLEMO

Ni denove atentigas niajn sekciajn estrarojn pri la fakto, ke s-ro P. W. Baas, nia ĝisnuna prezidanto, ne estos reelektebla kaj petas ilin, sciigi nomojn de kandidatoj por tiu funkcio antaŭ la 1-a de februaro al la ĝen. sekretario.

KOLEKTIVAJ ABONOJ.

Aktiva membro nia el Hengelo atentigis nin pri la fakto, ke pluraj esperantistoj ŝatus legi krom « Nederlanda Esperantisto » unu aŭ kelkajn internaciajn (fakajn) revuojn, ekz. « Esperanto », « Heroldo de Esperanto », « Sciencia Revuo », « Esperantologio » k.t.p. sed ne povas aboni ilin pro la sufiĉe altaj prezoj. Ĉar eble estas aliaj samideanoj, kiuj opinias same, la ĝen. sekr. proponas, ke ili sciigu ke ili ŝatus aboni. Tiuokaze ni povas krei la eblon de kolektivaj abonoj je relative malaltaj prezoj. Se ekz. 6 anoj deziras ricevi regule « Sciencia Revuo », ĉiu el ili pagas nur sesonon de la abonprezo kaj sendas la gazeteton post lego tuj al alia leganto laŭ vicordo, starigota de la ĝen. sekr. Se 2 el tiuj 6 anoj krome deziras legi « Heroldo de Esperanto » kune kun 5 aliaj membroj, ambaŭ krompagas sesonon de ties abonprezo, k.t.p. Do, legemuloj, anoncu vin kaj konigu al ni viajn dezirojn kaj ni volonte aranĝos la aferon por vi, ĉar la lingva nivelo nur povas altiĝi, se multaj anoj legas interesajn aktualajn revuojn!

U.E.A.

Ni atentigas niajn gelegantojn pri la flugfolio « Momenton, ni petas! » de U. E.A., aldona al ĉi tiu numero. Detalajn informojn pri, U.E.A. volonte donas la ĉefdelegito s-ro P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag kaj la lokaj delegitoj.

PROPONOJ POR LA JARKUNVENO

1. La ĉefestraro proponas ŝanĝi par. 47 de la regularo jene :
Het hoofdbestuur bestaat uit 7 leden. De leden van het hoofdbestuur worden gekozen voor de tijd van 3 jaar. Het eerste jaar treden 2 leden af, het daaropvolgende jaar eveneens 2 en het derde jaar 3, volgens door het hoofdbestuur op te maken rooster, met dien verstande, dat elk jaar een der leden van het dagelijks bestuur aftreedt.
Klarigo: La lastan jaron oni jam ne elektis naŭan ĉefestraranon, do fakte la ĉefestraro konsistis el nur 8 anoj. La ĉefestraro opinias, ke ĉefestraro konsistanta el 7 anoj sufiĉas; krome redukto de la membronombro al 7 rezultigos konsiderindan ŝparon.
Sekcio Hago proponas :
2. La jarkunveno de L.E.E.N. esprimu

mu la dezirindecon, ke « Nederlanda Esperantisto » aperu en sia malnova formato de 1948 kaj antaŭaj jaroj kaj komisiu al la ĉefestraro esplori la tiurilatan eblon.

